



Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, 3-a de Septembro 2018

Ĉeestantoj: Amri Wandel, Jehoŝua Tilleman, Eldad Salzman, Mikaelo Lineckij, Dror Gaon, Gabi Zeevi. Gastoj: Amos Ŝapira, Nava Bilitski

Protokolo de la antaŭa kunsido (9-a de Julio 2018) – publikigita en la retejo.
<http://esperanto.org.il/dosieroj/ELIEP201807.pdf>

1. Raportoj (Amri)

- a) En la Belartaj Konkursoj Luiza gajnis unuan lokon pro sia infanlibro "Tikiriki Tok el Strobilo". Amri gajnis honoran mencian por la eseo "La homo kiu komprenis la universan lingvon".
- b) En la UK partoprenis 12 israelanoj, Dror salutis kaj invitis por Eilat-Akaba 2019.
- c) Amri presigis 500 flugfoliojn por Eilat 2019, disdonis 300 en Lisbono kaj Italio.
- ĉ) Amri organizis la ELI-tablon dum la Movada Foiro. Helpis ankaŭ Gila kaj Dror.
- d) Amri partoprenis la Italian Kongreson en San Marino, salutis nome de Israelo
- e) La 12/10-an Amri rekomencos e-kurson "Nitsosot" en mezlernejo Ort Modiin.
- f) Gabi anoncis, ke supozeble estonte ne povos partopreni en la estraro, pro sia sanstato.

2. E-kursoj en Tel-Avivo - *la detalaj diskutoj plejparte estas prokrastitaj!*

- a) Komencanta aŭ daŭriganta kurso unue?
- b) Komencdatoj kaj reklamado - *Netraktita*
- c) Kompenco por Doron - *Netraktita*
- ĉ) Kursejo: WIZO, Bikurej Haitim (Miĥal) - *Netraktita*
- d) Kotizo - *Netraktita*
- e) Propono: unue la daŭriganta kurso, 8 lecionoj dum oktobro kaj novembro, poste la komencanta kurso inter decembro - aprilo. *Unuanime aprobita!*

3. Dratwerejo (Jehoŝua)

- a) La kliento kiu subskribis kontrakton en julio rezignis du tagojn poste. Tiumomente li ne havis monon por antaŭpagi. Amri menciis al li ke la rezigno povas havi jurajn konsekvencojn.
- b) Amos Ŝapira akceptis montri, kiam Jehoŝua estos eksterlande – sed estis tre malmultaj interesiĝantoj.
- c) Amos pludonis al makleristino kiu reklamis, sed daŭre ne sukcesis trovi klienton.
- ĉ) Postuloj de unu potenciala luanto: kalkado, klimatizilo. Sed fine nenio realiĝis.
- d) Reklamado en Jad-2: Amri sendos la datenojn al Gabi, kiu reklamos en Jad2.
- e) Amos serĉu tie en la poŝtkesto eblajn fakturojn de la urbestrejo, kiujn ni devos pagi.

2/...



f) Lastatempe mi ricevis mesaĝon de novjaraj bondeziroj kiuj estis adresitaj al ĉiu loĝejposedanto de str. Ĥelmit, kaj sekve de tio mi kontaktis telefone la sendinton, S-ron adv. Josi Omid. Li estas tiu, kiu sendis la kontrakton pri la evakuo-rekonstruo al la Asocio antaŭ kelkaj jaroj. Li petis, ke ni rapide subskribi la kontrakton, por ke ni rajtiĝu partopreni la kunvenon de la loĝejposedantoj la 21-an de oktobro. Konsiderante, ke ni decidis tiatempe subskribi (post la klarigoj kaj opinio de adv. Morag), mi proponas rajtigi Amri Wandel (prezidanto de la Asocio, n-ro de identeco 052296472) kaj/aŭ min, Jehoŝua Tilleman (vicprezidanto de la Asocio, n-ro de identeco 064453053), por ke unu el ni povu subskribi la kontrakton ĉe adv. Omid. *Decido: akceptita unuanime.*

4. Respondo al la registristo (*Ŝlomo ne povis partopreni pro sankauzoj, sed kontaktis telefone*)

a) Ni devas respondi ĝis la 12/9/2018.

b) Ŝlomo petis kompletigi 5 bezonatajn 5 aferojn (*kun * - bezonataj urĝe jam nun!*)

i. La Asocio devas raporti pri la progreso en la aĉeto de oficejo, ĝis la 31/12/18. (Amri sendis, vidu punkton 5).

* ii. Ni jen aprobis la nomumon de la kontisto Alon Karmeli kiel kontisto por 2018.

Unuanime aprobita!

* iii. La Asocio devas prezenti kopion de la laborplano de la kontrol-komitato (kies anoj estas Jael Selaĥ kaj Ŝaul Ĥasid) por la jaro 2018. Ni kontaktis Ŝaul kaj Ŝlomo telefone – kaj ili preparos la necesatajn detalojn.

iv. En la venonta ĝenerala kunveno ni formulos devigan metodon por repagi la vojaĝkostojn al la estraranoj, kun la aprobo de la membraro.

* v. Ŝlomo bezonas la detaligon de la kunvenoj en Ĥaifo kaj Jerusalemo dum la jaro 2017. (*Amri jam sendis pri Jerusalemo, Jehoŝua sendos pri Ĥaifo*)

c) La Asocio formale renovigas la rajton de la jenaj, ĉiu aparte, subskribi nome de ELI: Ŝlomo Ŝaĥar, n.ro de identeco 003311981, Eldad Salzman, n.ro de identeco 056438872. La supraj personoj estis elektitaj kiel havantaj rajton por subskribi en la nomo de nia Asocio, la Esperanto-Ligo en Israelo. *Aprobita unuanime!*

ĉ) Duonjara buĝeto: la defcito estas pli granda ol decidita. Se la enspezoj el la kurso ne superos la elspezojn, ni devos preni el la fonduso kiu estas deĉita aĉeti oficejon.

- *Notite*

d) Korekto de la protokolo de Majo (pri pago por Doron): Ŝlomo kontraŭas pagi du subvenciojn al la sama persono en la sama jaro. Oni devas diferencigi inter la stipendio kiu honoras la multjaran laboron de Doron, sume 10 mil siklojn - kaj inter la kurso.

Akceptita unuanime!

5. Oficejo (Amri)

a) Amri daŭrigis la kontaktojn pri la oficejo en Begin 74 (Maariv-kruciĝo), 565,000 NIS+VAT, 40 kvadratmetroj.

b) Kun la VAT kaj aldonaj impostoj kaj elspezoj kostos 780,000 NIS, nome mankas 300 mil sikloj.

3/...



- c) Amri provis sensukcese akiri la bezonatajn pruntojn aŭ hipotekon, aŭ helpon de samideanoj.
- ĉ) Amir Naor sendis mesaĝon kontraŭanta la aĉeton, kun detalaj argumentoj.
- d) Sekve de tiuj problemoj Amri decidis haltigi la aĉeton kaj la serĉadon.
- e) Ŝlomo pensas ke ni nepre devas daŭrigi la serĉadon de oficejo, tio estas unu el la postuloj de la Registristo, por ĝustigi la grandan saldon kiun ni havas.
- f) Amri: ne indas serĉi se ni ne intencas aĉeti. La estraro devas fari klaran decidon, kun respondoj al la kontraŭoj de Amir. En julio mi sendis la rezignan mesaĝon al la tuta estraro petante reagojn, (vidu en la aldonajoj) sed neniu reagis. Mi ne pretis preni la respondecon por financa katastrofo por ELI, kiel avertis Amir, sen klara subteno de la estraro.
- g) Amri pensas ke fine indos aĉeti oficejon, kaj finance (spari la lu-koston de klubejo/kursejo kaj ricevi lu-pagon por la oficejo), kaj pro la postulo de la Registristo. Sed unue ni devas certigi ke ni havos la monon (hipoteko).
- ĝ) Ni devas voĉdonigi la membrojn dum la jarkunveno, por principe aĉeti oficejon.
- h) Jehoŝua: ni devas serĉi plu! Tio montras nian klopodon en la afero.

6. Israela E-isto (Mikaelo, Amri)

- a) Amri dissendis n-ron 164-5 en julio al eksterlando (pli ol 100) kaj en Israelo
- b) N-ro 166 (vintro 2018) estas en la manoj de Mikaelo. Li havas jam materialon, ankaŭ ĝeneralan. Li sendos demandojn al Amri pri ilia enhavo, ktp.

7. IK-20 Eilat+Akaba (Amri)

- a) Informado: Amri presigis 500 flugfoliojn por Eilat 2019, disdonis 300 en Lisbono kaj Italio. Dror invitis en la inaŭguro en Lisbono, Amri dum KAEM-kunsido, Jehoŝua dum MONA-kunsido.
- b) Reta aliĝilo kaj modifitaj datumoj (Dror prizorgos)
- c) Amri fiksas provizorajn prezojn por la du eventoj (po 150 eŭroj) kaj por la ekskurso.
- ĉ) Amri rezervos en "Club-Inn" Eilat kaj en Akaba. En Eilat: ĉ. 550 NIS po nokto por duĉambra apartamento kun unu banĉambro, ĝis maksimume 6 personoj.
- d) Artistoj: Kajto povos nur en Eilat, duontempe. Por Akaba+Eilat Amri demandis al Jomo. Li kostos malpli, pro rabatoj, kaj pretas tranokti kun la aliaj.

Decido: ĉar ne urĝas, prokrasti por ebligi plian diskuton en la venonta kunsido

8. Jagil

Post lia denunca letero al la Registristo, kiu sen la grandega laboro de Ŝlomo, Amri kaj adv. Modan povus ruinigi ELI, li aŭdacas denove aperi en niaj kunvenoj, kvankam li ne estas jam membro. Kiel eviti pliajn ciklojn de atakoj kaj damaĝo al ELI? Post diskuto de Nava, Amri, Jehoŝua kaj aliaj: *Decido: ni turnos al niaj du advokatoj, por ricevi konsilojn, kiujn pli efikajn rimedojn ni povas uzi por eviti ripetigon de liaj atakoj kaj damaĝoj.*

La venonta kunsido: 8-a de Oktobro 2018, 19:30

Protokolis: Gabi Zeevi